

## Terminologia anguleto

## Ĉu vere "habitato"?

Ĝue mi trastudis en Scienca Revuo 2/2000 la tre kompetente verkitan kontribu-  
aĵon pri la biodiverseco (*de Wit*, 2000). Tamen, unusola tiea termino, kiun mi  
mencias supratitole, vekas mian dubon. Ne eblas kontesti, ke la latina *habi-*  
*tatum* estas la supino, do la substantiva formo de la verbo *habitare* (= loĝi). En  
Esperanto, simile al aliaj lingvoj, la substantivo "habitato" perceptiĝas pasive,  
kiel io habitata, do kiel derivaĵo de la verbo *habiti* (*Es: habitar, Fr: habiter,*  
*k.t.p.*). Sed *habiti* oni povas nur lokon, ne personon, dum la esperantlingva -ato  
rilatas, ĉu al aĵo, ĉu al persono: dikti - diktato, okupi - okupato k.a.

Mi ekzemplu la situacion helpe de la difino franca: *Habitat, dérivé de habiter: lieu spécialement habité par une espèce végétal ou animal.* Mi substrekis la  
vorton *lieu* (= loko). En *Minnaja* (1996) mi trovis: *habitat (lat.) s.m.* (viv)-me-  
dio, loĝloko. La germana kaj multaj aliaj lingvoj aplikas siajn proprajn vortojn:  
*Standort, Wohnort* (*Krause*, 1983), Cs: *stanoviste*, Po: *miejce wystepowania*,  
Ru: *mesto obivania*, k.t.p.

Mi revenu al Esperanto. Certe necesas distingi inter lavato kaj lavejo, do  
same habitato kaj habitejo. Se oni nepre deziras lanĉi por biologio, ekologio kaj  
similaj uzoj la verbon *habiti* (tr) tiam la loko estos **habitejo**, ne "habitato".  
Aliokaze, se Esperanto limigus sin al neproduktiva radiko "habitat-", tiam oni  
devus aserti, ke iu organismo "loĝas en habitato", ĉar "habitatas" signifus neni-  
on alian ol "esti habitato". Jen la neeviteblaj konsekvencoj de la zamenhofa  
gramatiko...

Fontoj: *de Wit, B.* (2000): Biodiverseco: esenco de la vivo. - Sci. Rev. 51(2), 18-24  
*Krause, E.-D.* (1983): *Wörterbuch Deutsch - Esperanto.* - VEB Verlag Enzyklopädie, Leipzig  
*Minnaja, C.* (1996): *Vocabulario Italiano - Esperanto.* - CoEdEs, Milano

J. Kavka

Luzna 7 - Vokovice

CZ - 160 00 - Praha 6 / Ĉeĥio

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

22a JARKOLEKTO 2001

Informigu pri la okazantaĵoj en la nova 3a jarmilo pere de la  
internacia revuo MONATO. Ĝi raportas el ĉiuj anguloj de la mondo,  
tra la okuloj de lokaj loĝantoj kaj informos vin pri aspektoj kaj eroj  
kiujn aliaj naciaj kaj internaciaj revuoj en la mondo preteratentas.  
En la tuta Esperantujo ĝi estas unikaĵo, la nura revuo kiu plenumas  
la celon de Esperanto ĝisfunde: informi ne pri, sed per Esperanto.

Mendu la revuon ĉe la eldonanto  
Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140  
B 2000 Antwerpen  
BELGIO

EUR 39,00

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

## Pres-Indikaĵoj

ISSN 0048-9557

Laserkopiita: Marto 2001

Eldonanto: ISAE

## Provizora redakta teamo

La estraro de ISAE

## Responsa redaktanto por tiu ĉi kajero

R. Sachs (DE) - sa

Kunredaktanto

J. Kavka (CZ) - ka

Lingva kontrolanto

O. Haszpra (HU) - ha, I.F. Bociort (RO) - bo, J. Wozniczka (PL) - wo

## Eldonkvanto: 200 ekzempleroj

Adreslisto laŭ kotizoj ricevitaj antaŭ ekspedo.

Pri la enhavo de la artikoloj en Scienca Revuo respondecas la koncernaj aŭtoroj.

Ili ankaŭ responsas pri formo kaj formato, se ili mem kompostis.

## Redaktaj rimarkoj pri la artikoloj

|                          |         |           |
|--------------------------|---------|-----------|
| 1. Kavka                 | komp sa | red ka    |
| 2. Bociort               | komp sa | red wo    |
| 3. Nagata                | komp sa | red sa/wo |
| 4. Gunther               | komp sa | red ka/sa |
| 5. Scienca eĥo           | komp sa | red sa    |
| 6. Terminologia anguleto | komp sa | red ka    |

komp = kompostis; red = lingve kontrolis kaj redaktis

## Membrokotizo de ISAE

Referencvaluto: 20.00 eŭroj/jare

## Pagmanieroj:

- 1) per ĝirado al Germana Poŝtĉeka Konto: nome de  
ISAE-SACHS: Konto n-ro 140 380 - 608  
ĉe *Postbank Frankfurt/Main (DE)*: Banka kodo 500 100 60
- 2) al ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL): isae-z
- 3) per Landa Delegito de ISAE aŭ Peranto de la koncerna lando

Nepre informu pri via kotizpago kaj valida adreso la eldonanton:  
*ISAE/Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege, Germanio*